

PENSEO

N-ro 154

aŭg./2004

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 15-a jaro <http://www.elferno.net/penseo.htm>

Ai Qing (1910-1996)



Dedeĉite al la Suno

Matene kiam mi vekigās,
mi ĝojas je la vid' de via
lumo,
lastnokte kvankam mi tre
lakis

kaj min obscedis inkuboj sennombraj.
Karesa, freŝa, hela lumo via
ŝutiĝas sur fenestron mian longe fermitan,
la fenestropaperon farbas per helflav' kiel
poleno,
en krado hele blua inkrustitan.
Mi saltas el la lito, kun dankemo,
apertas la fenestron dum tutvintr' fermitan,
enlasas l' or-tekstan tablotukon diafanan
sterniĝi sur la tablon apud la fenestro.
Kun mir' kaj ĝojo, mi vin vidas:
ververe kaj sendube
vi staras sur la montpinto kontraŭa
serene ridetante.
Mi pene mian okulparon malfermegas
por kapti soife imagon vian:
vi tiel 'stas intensa, svaga kaj majesta!
pupitrojn miajn via lum' pikdolorigas.
Ho, Suno, vi senmorta sciemulo,
vin vidas eĉ la plej malfeliĉulo,
enkore sentas li konsolon vian.
Forĝist' de temp' vi estas,
kaj orumisto de bonhava vivo;
vi forĝas tagojn en sennombrajn radojn,
surper antikva ebenaĵo rondflugantajn...
Se ne ekzistus vi, ho Suno,
vivaĵoj ĉiuj dronus en mallumo,
eĉ se flugilojn ili havus, ili kiel

vespertoj flugus en eterna nokto.
Vin amas mi jen kiel mian proran panjon.
vi nutras miajn pensojn kaj konceptojn,
pro tio mi fervore vivas, min turmentas por la
idealo,
ĝis kiam Mort' forportos mian vivon.
Post longa kaj soleca vintro,
hodiaŭ volas mi ascendi la montpinton,
min senvestigi kaj nudigi
por duŝi mian animon en via lumo...



elĉinigi **Kulo**

En Pasinta Vintro

(Proza Poemo)

Bang Chui

En pasinta vintro, mi, depende de sopiroj,
ofte min varmigis
Kvankvam la folioj defalintaj, kiuj flirtis pli
kaj pli forforen, ne plu estis freŝaj vangoj, la
temperaturo de florado en la memoro same
povas flari la konatan estintecon.
Ni, renkontiĝinte en la sama sezono kaj
disiĝinte en la alia, similas al du flankoj de la
sama folio sur la sama branĉo, kiuj intime
ligiĝas unu kun la alia, sed neniam
intervidiĝas.
Prosperiĝo kaj velkiĝo certe aranĝitis kiel
flagra enigmo destinita tute en la antaŭmorta
mondo. Kaj kiu daŭrigos tiun labirinton en la
postmorta mondo?

La sama korligo estas rekta linio jen

aperanta jen malaperanta, liganta min ĉe ĉi fino kaj vin ĉe la alia. Nia sorto ŝajnas liuta kordo kaj tamen rompita lotusradiko kun nerompitaj fibroj.

La sentnodo, kiu ne plu estas klasika, ĉiam obstine cirkulas en malsamaj aferoj. En la pasinta vintro, la sopiro, kiun mi ekbrulis, povis ankoraŭ ne baksekigi ajnan frazon interne.


Kruĉo da teo, kiu ŝanĝiĝas de forteco al malforteco kaj inverse, sidas sur la forno meditante. Por repaĝi tiun, kiu donis al vi varmon, vi devas fintrinki sopirojn.

Kiam vi tenas te-tason en la mano, vian vizaĝon karesas la aromo, vere simila al la intima figuro. Transpasinte montojn kaj riverojn, piedpremite knare la postrestantan neĝon kaj enirinte la koran ĝardenon pere de sekreta vojeto, ni revoku antaŭ niajn okulojn la hirundojn, kiujn ni liberigis tiun jaron.

Fakte estas malfacile por ni renkontiĝi. La imago plene disvolvita ankaŭ fariĝis akva fumo incitita super la akvosurfaco de la rivero. Lasu la lastan romantikon flosi kiel strioj da malpleno.

Kion povas diri la krepuskaj nuboj sub la vaste malplena ĉielo ekster la fenestro? En ĉi tiu momento, kiam ni mantenas ĉi tian poezian senton samkiel enŝovante faskon da ĉiamverdaj pinbranĉoj en maljuniĝantan sunlumon por vidi, kiel la delikata aromo fluas en la dormon longnoktan.

Dum sekva vintro, ni, depende de niaj sopiroj, eblos nin liberigi de la implikado de frosto.



elĉinigis **Niu Niu**

Bingxin (1900-1999)

* ĉina moderna verkistino



superhomo

Lia cerbo ekstreme laciĝis, kvankam li penis elpuŝigi tiujn pensojn, sed tiuj implikajoj svarmis en lian kapon kontraŭ lia volo.

Post kelkaj tagoj, la voĉo de ĝemado ĉesiĝis. La nokto restis kvietita kiel antaŭe, kaj He Bin havis sensonĝan dormadon. Tiuj pensoj antaŭ kelkaj tagoj, similaj al malforta lumo de matena luno sur la pinto de glacimonto, malaperis dum momenteto.

Anjo Cheng, kunportante Luĉjon, venis kelkfoje por diri dankon al him, sed li tamen ŝajnis forgesi tion. Flegme levinte sian kapon kaj ĵetinte ekrigardon, li skuis sian kapon kaj revenigis siajn okulojn al la libro. Siaparte Luĉjo, kun suprenlevita nigra kaj pufa vizaĝo, staris ekster la pordo, maltrankvile preskaŭ ĝis larmoj.

Tiun tagon ĉe vespermanĝo, He Bin diris al Anjo Cheng, ke li transposteniĝos al alia loko kaj ekiros postmorgaŭ matene, kaj li volis likvidi sian ŝuldon por loĝado kaj manĝado.

Anjo Cheng eksentis deprimiĝon. La kvietaj luantoj kiel li estis raraj, sed ŝi ne povis reteni lin, kaj nur diri gratulon anstataŭe. Iome kapjesinte, li reiris al sia ĉambro por ordigi la librojn.

Li sentis sin terure laca kaj endormiĝis post momenteto. --- Subite li aŭdis kelkfojajn movetojn de la pordon kaj iu ŝajnis ĝin puŝmalfermi. Senvorta kaj senmova, li kuŝis kviete, kaj post momenteto tute malaperis ĉiaj sonoj.

La sekvan tagon, li sin okupis post la pordo riglita. Li eĉ rifuzis la helpopropozonon de Anjo Cheng kaj promesis postuli ties helpon kiam li estis bezononta. Post kiam ŝi malsupreniris, li

abrupte sin atentigis, ke li forgesis aĉeti ŝnurojn. Kiam li malrapide malfermis la pordon, homfiguro fulme malaperis. Je plua pririgardado, li trovis, ke Luĉjo sin kaŝis malantaŭ la kontraŭa pordo. Ĵetinte sian heziteman rigardon ĉirkaŭen, li ne trovis serviston ĉeloke. Kaj li vokis, “Luĉjo, aĉetu por mi kelkajn ŝnurojn.”

Luĉjo ŝanceleme alpaŝis, kaj ĝoje preninte monon, fluge malsuprenkuris la etaĝon.

Post kelka tempo, Luĉjo, kun ruĝaj vangoj pro kurado, anhele suprenkuris, prenante ŝnurojn en unu mano. Li tenis sian alian manon malantaŭ la dorso, el kiu unu aŭ du orflavaj steletoj malkaŝiĝis malklare.

Li donis la ŝnurojn kaj ŝajnis diri ion kun la kapo levita. Lia mano ankaŭ malrapide moviĝis antaŭen el post la dorso.

Donante nenian atenton al li, He Bin deprenis la ŝnurojn kaj eniris.

Post ordigo en okupiteco, li, kuntenante siajn manojn, paŝis tien kaj ĉi tien por rigardi. La ĉambro jam fariĝis malplena. Kiam li kuŝiĝis sin, li sentis varmegon. Kaj li ellitiĝis kaj iomete malfermis la pordon kaj fenestrojn, tiel ke li povis ĝui la envenantan friskan venteton..

“Ankoraŭ varmege. La cerbo ŝajnas en malordo. Kaj la ĉambro estas tro vaka kaj malplena. --- Jam du tagojn mi lacigas min per okupiteco. Nature mia vivado sin montras malnorma. Tamen kial mi ekpensas pri la malsanuleto en la malfrua nokto? ... Amata... Ne pensu plu. Mi ekstreme enuiĝas!”

La delikata venteto flirte levis la mallongajn harojn ĉe lia frunto, sekigis la ŝviterojn sur lia kapo, kaj iom post iom lule ventumis lin en la sonĝon.

La blankaj muroj je kvar flankoj, malhela lumo en la ĉambro tuttage, mallumaj ombroj ĉe la murangulo. Tempo forpasis minuton post minuto.

Amata patrino, miriadoj da steloj sur la nokta ĉielo, floroj en la korto. Ne pripensu

plu... tro... enuiĝe.

Mallumo rampis sur la tegmento. Nenio videblis. Tempo forpasis minuton post minuto.

Vento intensiĝis. La aloĉambro ekheliĝis. Miriadoj da steloj pelmele flirtis enen. En stellumo malrapide eniris virino blanke vestita, kun la dekstra mano levanta la baskon de jupo kaj la maldekstra premanta sian fronton. Ŝi alproksimiĝis akompanate de delikata bonodoro. Klininte sian korpon, ŝi pririgardis, pririgardis solene kaj kviete. Ŝia rigardo plenis je amo.

Lia ekhavis sensentajn nervojn dum momento! Ellitiĝu, ne, ĉar estas en la lulilo. Ho, patrino, amata patrino!

Ho, patrino! Mi volas ellitiĝi kaj sidiĝi en via sino. Vi brakumu min en vian sinon.

Ho, patrino! Ni sopiru unu al alia, ne forlasu unu de alia.

Ŝi retiriĝis malantaŭen iom post iom, ankoraŭ kun amemo en sia rigardo. Ĉio malklariĝis. Steloj faladis kiel pluvo kaj ĉiuj horizonte flugis al la malluma ombro ĉe la murangulo. --- “Ho, patrino! Ne foriru, ne foriru!...”

La vizaĝesprimo de amo, kiu jam kaŝiĝis dum dek kelkaj jaroj, denove riveliĝis sur la vizaĝo de He Bin, kaj liaj larmeroj, kiuj nevidebliĝis, ankaŭ faladis perle.

Ankoraŭ restis al delikata bonodoro, la virino blanke vestita. Li iome malfermis siajn okulojn. La blankaj muroj ĉe kvar flankoj, la malhela taglumo, kelkaj mallumaj ombroj ĉe la murangulo, kaj alblovita delikata bonodoro. Kiam li ekmovis, li tuj sentis, ke malgranda homfiguro eliras piedpinte kaj ĉe la pordo turnas sian etan vizaĝon por rigardi. Li estis Luĉjo, la malsanuleto en malfrua nokto.

He Bin penis sidiĝi. Tie sur la ŝnure ligita librostako staris korbeto da orflavaj floroj. Vestinte sin per sensubŝtofa jako, li aliris la korbeton, sub kiu estis subpremita paperpeco kun skribaĵo. Sub la malhela lumo, li legis:

Mi ne scias, kiel danki vin pro via bonfaro.

